


ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando

Esperantobladet

Lokakuu ♦ Oktobro

5/1998



**Europanto, la
latina kaj Espe-
ranto, p. 3-4**

**Pasporto al la
tuta mondo,
p. 12**

**PEN-
mondkongreso,
p. 10-11, 14**

Luontopolun varrelta. Marjolan syyspäivät s. 5.

Tiu ĉi numero aperos ankaŭ en Interreto: <http://www.sci.fi/~matlah/eaf/e-lehti>

Esperantolehti

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: *Aimo Rantanen*

PL 2, 40801 Vaajakoski. ☎ (014) 261 438 ✉ aimo.rantanen@jylk.jyu.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎ (09) 530 1804 ✉ ilkka.santtila@icl.fi

WWW-sivujen taitto/ Enpaĝigo de TTT-paĝoj: *Matti Lahtinen*

Syrjälänkatu 6 B 61, 40700 Jyväskylä. ☎ (014) 615 054 ✉ matlah@sci.fi

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 80 mk/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 60 mk; Baltio 60 mk, aliaj landoj 80 mk.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adressanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmogatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Postisiirtotili/Postgirokonto/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 500

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Jukka Laaksonen*

Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere. ☎ (03) 255 4724; työ/laboro: (03) 249 4313

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Jukka Pietiläinen*

Nyyrikintie 4 H 47, 33540 Tampere. ☎ (03) 261 7871 ✉ tijupie@uta.fi

Sekretario/Sihtööri: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Anna-Liisa Ali-Simola, Friskinkatu 2 A 33, 20360 Turku. ☎ (02) 238 7767

Kimmo Hakala, 72300 Vesanto. ☎ (017) 648 831 ✉ khakalat@nettilinja.fi

Seija Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609

Tuula Virolainen, Auringonkatu 8 E 48, 02210 Espoo. ☎ (09) 803 6149 ✉ tuula.virolainen@vtt.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Jussi Jäntti, Retkeilijäntie 5 B 14, 70200 Kuopio. ☎ (049) 859 641

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (03) 348 4245

Ritva Sabelli, Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 635 902 ✉ ritva.sabelli@sfs.fi

Rahastonhoitaja/Kasisto: *Antti Mikkola*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ antti.mikkola@orion.fi

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Toimisto/Oficejo: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

UEA:n pääedustaja / Ĉefdelegito de UEA: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎✉ (09) 275 5528

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Esperanton pahin vihollinenko?

Savon Sanomissa oli 28.7 juttu Europantosta ”Wat tu know nicht, tu invente” (Keksi se, mitä et tiedä) ja sen ingressiotsikkona oli ”Uusi eurokieli alkoi pilasta, mutta leviää väkisin puhujiensa tietämättäkin”. Europanto on vitsinä alkanut sekakieli, joka pohjautuu kouluenglantiin täydennettynä sanoilla ja rakenteilla, joita yleiseen tietoisuuteen on tarttunut tärkeimmistä länsimaisista kielistä, mukaanluettuina latina ja kreikka. Jokainen useita kieliä opiskellut on joutunut hassuttelemaan europantolla, eli sotkemaan tuntemiensa kielten sanoja ja rakenteita keskenään samassa lauseessa, ellei muista sanoja eikä pysty muodostamaan lausetta yhdellä kielellä.

Tällaisesta sekakielestä käytetään joskus termiä puolikielisyys, esimerkiksi puhuttaessa siirtolaisista, jotka sekoittavat äidinkielensä sanoja uuden maan kieleen tai puhuvat uutta kieltä käyttäen äidinkielen rakenteita, eli tavallaan raakakäännöskieltä. Jiddish oli Europanton kaltainen sekakieli, pohjanaan alasaksa. Yleensä Europanton kaltaisille sekakielille on ominaista helppous, kuka tahansa hyvän kielikoulutus pohjan koulussa saanut voi alkaa muodostaa lauseita ilman sen suurempia ponnistuksia. Europantosta kuitenkin puuttuu se melko yleinen piirre, mikä näitä sekakieliä yhdistää, eli ne ovat eksklusiivisia, omaa kieltä puhumattomia poissulkevia.

Mielestäni Helsingin slangi on hyvä esimerkki kielimuodosta, joka muistuttaa Europantoa tekotavaltaan, mutta sitäkin puhumalla pyritään sulkemaan pois ulkopaikkakuntalaiset, jotka eivät kuulu slangia ymmärtävien sisäpiiriin. Europanto kuten Esperanto-

kin keksittiin, jotta voitaisiin helpottaa kansainvälistä kanssakäymistä. Länsimaisen sivistyksen omaava ymmärtää hyvin europantoa, mutta huolimatta esperanton läpinäkyvyydestä, sen ymmärtäminen vaatii ainakin alkeiskurssin. Uskollisimmat seuraajansa Europanto on saanut monikielisistä maista, kuten Belgiasta, Sveitsistä ja Kanadasta. Jos suomalainen haluaisi puhua Europantoa, ehkä romaanisten kielten osuus siinä olisi vähäisempi. Suomalainen puhuisi Europanton paikallismurretta.

Lauseenmuodostustapojen valtava määrä on Europanton heikkous. Esimerkiksi kysymys Paljonko tämä maksaa? voidaan muodostaa 6 kielen palikoista 144 tavalla. Tämä lisää semanttisen redundanssin eli merkityso pillisen liika-aineksen tähtitieteellisiin lukuihin. Esperantistit ovat pitäneet Europanton isän Diego Maranin mielestä Europantoa pahimpana vihollisenaan, mutta tosiasias sa esperanton päävihollinen on englantti. Esperantistien katkeruuden ymmärtää, yhdistyyhän Europanto-nimi sanana assosiatii visesti, mielle yhtymältään, nimeen Esperanto. Europanto voisi olla Esperanto-sana, jos toisen kirjaimen u:n päällä olisi hattu.

Nimen kielelle valinnut Marani loi turhaan linkin Esperantoon, koska niin erilaisia nämä molemmat keinotekoiset kielet ovat. Esperantolla on monia ominaisuuksia, esimerkiksi ”sisäinen idea”, joka on kieleen sisäänrakennettu. Sitä ei ole yhdelläkään muulla keinotekoisella kielellä, ei Europantollakaan. Europanton päätarkoitus on olla helposti ymmärrettävä ja vaivaton, helposti omaksuttava. Tavallaan se on aikansa kuva, pikaruokaa ruisleivän asemasta.

Aimo Rantanen

Esperanto kaj la latina

Latina lingvo vivas – almenaŭ en Finnlando – novan renesancon kaj latinlingvaj novaĵel-sendoj de la Finna radio estas famaj eĉ internacie. Antaŭe la lingvo latina estis ĝenerale konsiderata nur kiel lingvo de medicino kaj teologio. Sed nuntempe ĝi fariĝis pli populara almenaŭ en universitataj rondoĵoj. La famo de latino en Finnlando baziĝas sur la elpaŝoj de relative malmultaj homoj. Ĝenerale la publika rilatado al la fenomeno estas komprenebla kaj akceptema. Ĉar la pledantoj de la latina uzas plurajn samajn argumentojn kiel ni esperantistoj, fariĝas facile imagi, ke Esperanto kaj latino estas konkurantoj. Tiel ja estas, kiam ekz. ambaŭ lingvoj estas proponataj kiel pontlingvon de internaciaj organizaĵoj. La latina estas, sekve, facile konsiderata kiel minaco al Esperanto.

Ni scias, ke d-ro Zamenhof, kiu en lernejo konatiĝis kun la latina, estis unue entuziasma, sed poste konstatis, ke ĝi ne taŭgis al liaj bezonoj por havi duan lingvon por ĉiuj. Egale ni scias, ke kvankam la latina dominis la skribitan vorton dum pluraj jarcentoj, ĝi tamen post la naskiĝo de naciaj ŝtatoj kaj reformacioj devis subiĝi al aliaj lingvoj. Ankoraŭ dum la latina hegemonio oni jam planis plurajn alternativojn por tutmonda lingvo, sed tamen neniu el ili realiĝis malgraŭ tio, ke la eblecoj por la venko de tia lingvo dependis de konsiderinde malpli granda homnombro ol hodiaŭ. Se ni komparas la hodiaŭajn kulturajn bazojn de la latina kaj Esperanto, tiam ni povas resti trankvilaj, ĉar la nuna Espe-

ranto-kulturo estas multe pli varia ol tiu de la latina.

Lingvosciencistoj ni ja scias, ke la latina estas multe pli malfacila lingvo ol Esperanto. Do, restas nur la fakto, ke tamen la latina estas multe pli konata lingvo ol Esperanto. La plej grava kaŭzo por tio estas la aĝdiferenco inter la lingvoj. Sed certe al tio influas ankaŭ la fama timo de nekonataj kaj artefaritaj aferoj. Ĉu ni esperantistoj bone faras nian laboron? Konsiderante la eblecojn kaj kapablojn mi volonte diras jes. Eĉ mi povas imagi, ke rilate al la nombro de esperantistoj ni ĉiuokaze laboris bone – sed tamen ne sufiĉe. Ni konfesu, ke en pluraj aferoj ni estas amatoroj. Se ni ne povos fariĝi profesiuloj, ni povas tamen esti bonaj aŭ eĉ bonegaj amatoroj. Ankoraŭ ne venis tempo, ke Esperanto ricevu vastan publikan agnoskon. Sed esperante, ke tio iam okazos, ni ne timu la latinan kiel konkuranto aŭ konsideru ĝin (kiel ankaŭ ne la anglan) nia malamiko.

Aŭtunaj tagoj en Lappeenranta

En la nomo de la estraro de EAF mi volas kapti la okazon kaj doni multajn dankojn al Esperanto-grupo en Lappeenranta. Malgranda grupo vi sukcesis aranĝi al ni alilokanojn agrablan ejon, etoson kaj programon kun sufiĉe da internacia koloro. Ankaŭ via sukceso en loka informado estis ege bona. Vi certe meritas pli ol belajn vortojn kaj ĉapellevon!

Jukka Laaksonen

Innostavat syyspäivät

Suomen Esperantoliitto järjesti 5.-6.9.98 Syyspäivät Marjolan loma- ja kurssikeskuksessa Lappenrannassa. 63 syyspäivä-osallistujan joukossa oli esperantisteja lähes joka puolelta Suomea, sekä 3 vierasta Venäjältä, yksi Virosta ja yksi Bulgariasta. Marjolan ympäristö houkutteli luonnonläheiseen toimintaan. Lauantaina järjestettiin luontopolku tietokilpailuineen sekä petankkiottelu ja sunnuntaina aamukävely Luukkaansalmen sillalle. Sunnuntaiamuna aikaisin heränneet suunnistivat ottamaan kuvia upeista maisemista tai muuten vain kävelemään. Marjolan syyspäivät olivat aiheuttaneet talkoolaisille paljon työtä, jonka hedelmiä me muualta tulleet pääsimme nauttimaan ilman ponnisteluja. Vaikka Lappeenrannan Esperanto-ryhmään kuuluu vain parikymmentä jäsentä, he onnistuivat luomaan innostavat syyspäivät, joita on kiva muistella jälkeinkinpäin. Kiitokset järjestäjille!

Lauantain ohjelma alkoi Anna-Liisa Ali-Simolan pitämällä Esperanton alkeiskurssilla. Viimevuosien traditiona on ollut järjestää Esperanto-tapahtumien yhteydessä pika-alkeiskurssi. Muissa yhteyksissä, esimerkiksi kerhojen järjestäminä, alkeiskursseilla tuntuu olevan vaikeuksia. Internet-kurssit, Jyväskylän Esperanto-opintoviikot ja E-tapahtumien yhteydessä järjestetyt alkeiskurssit tuntuvat tällä hetkellä olevan tehokkaimpia muotoja saada potentiaaliset esperantistit liikkeelle. Etelä-Suomessa on pidetty kyllä menestyneitä työväenopistokursseja, joten perinteisilläkin menetelmillä voidaan saada uusia adepteja esperantoliikkeeseen.

EAF:n puheenjohtaja Jukka Laaksonen avasi lämmintunnelmaiset Syyspäivät. Tervetuloivotukset Lappeenrantaan esitti paikal-

isia esperantisteja edustava Irja Miettinen. Mikaelo Bronštejn esitti useaan otteeseen syyspäivien aikana laulujaan kitarasäestyksellä. Luontopolku Esperantoa koskevine kysymyksineen tuli oikeaan aikaan lounaan jälkeen. Ryhmät ”Pino” ja ”Laktovojo” saivat täydet 10 pistettä kysymyksistä, jotka vaativat melko suurta Esperanton ja Esperanto-kulttuurin tuntemusta. Ljubomir Trifončovski, bulgarialaissyntyinen nukketeatterin johtaja ja E-kulttuurilehden Literatura Foiron päätoimittaja, esitteli Sabira Ståhlbergin uuden romaanin Durankulak, jonka julkistaminen oli ajallisesti syyspäiviä lähellä. Mika-



Irja Miettinen toivotti syyspäivien osallistujat tervetulleiksi Lappeenrantaan.

elo Bronštejn esitteli uusinta käännöstään, esperantonnosta Venäjän kirjallisuuden isän, Aleksandr Sergejevitš Puškinin (1799-1837) runoista.

Lauantai-iltapäivä jatkui petankkiottelulla. Lauantain järjestetyn ohjelman päätti Kalevalainen ilta. Ohjelmassa oli kansantanssien opetusta, joka innosti syyspäiväosallistujat melkomoisiin taidonnäytteisiin. Opettajan, hartolalaisen Eeva Hukkakallion, esperantistien esittämä kansantanssi teki tyytyväiseksi. Ohjelmassa seurasi kansantanssin jälkeen kalevalaista laulantaa sekä suomeksi että Esperantoksi. Seija Kettunen piti esitelmän esperantokielen Kalevalan kääntäjästä ja maakuntalehti Keskisuomalaisen pitkäaikaisesta toimittajasta, Joh. Edv. Leppäkoskesta.



Mikaelo Bronštejn ja kitara.

Mielenkiintoinen yksityiskohta oli Leppäkosken ääni nauhoituksena, jonka oli tehnyt tikkakoskelainen Aulo Minell. Missä ovat Leppäkosken jälkeenjääneet runot, sitä kyseltiin läsnäolijoilta. Jukka Laaksonen raotti salaisuuden verhoa: pankkilokerossa. Illan aikana jaettiin palkinnot petankkiottelun ja luontopolun tietokilpailun voittajille. Ohjelman jälkeen vapaamuotoista iltaa jatkettiin kuuntelemalla Mikaelon balladeja keskiyöhön saakka.


Sunnuntaiamuna Anna Ritämäki, juristi jonka erityisalana on kansainvälinen oikeus, piti esitelmän 50-vuotiaasta Ihmisoikeuksien julistuksesta, jonka virallinen käänös on olemassa myös esperantoksi. Kouluaikana yhteiskuntaopin tunnilta saamani julistus osoittautuikin Anna Ritämäen käsittelyssä paljon kovemaksi paperiksi kuin kouluaihana uskottelin. Monet kansainvälisen oikeuden kysymykset voidaan johtaa suoraan Ihmisoikeuksien julistukseen. Se on oikeudellisesti velvoittava. Kun Ihmisoikeuksien julistus julkaistiin 10. joulukuuta 1948, alkuvaiheessa korostuivat siviili- ja poliittiset oikeudet. Toisen sukupolven tulkinta ihmisoikeuksista korostaa taloudellisia, sosiaalisia ja kulttuurisia ihmisoikeuksia. Tavallaan toisen sukupolven tulkinta tuo ihmisoikeudet lähemmäksi tavallista ihmistä.

Syyspäivät päätti kiertoajelu Lappeenrannassa ja vierailu Jumalansynnyttäjän suoje-luksen kirkkoon, jossa kirkkoherra Markus Petsalo piti pienen rukouspalveluksen syyspäiville osallistuneiden puolesta. Mielenkiintoinen oli kirkkoherra Petsalon toteamus ortodoksisen liturgian kielen kansainvälisyyden vertaamisesta kansainväliseen kieleen esperantoon.

Aimo Rantanen



Anna Ritamäki ja ihmisoikeudet.



*Vierailu Lappeenrannan Jumalansynty-
täjän suojeluksen kirkossa.*



Kansantanssin opettelua.

Intervjuo kun doktoro Sabira Ståhlberg

Antaŭ unu jaro vi, Sabira Ståhlberg, iĝis la ĉefredaktoro de Kontakto. Hazarde mi vidis la trian numeron redaktitan de vi, kaj ĝi estis tiel bela kaj interesa, ke mi tuj abonis la revuon. Ĉu dum la jaro aliaj same faris kaj kreskis la nombro de abonantoj?

◆ Por esti tre sincera: mi ne scias, tion oni povas vidi nur fine de la jaro. Sed jes, okazis ioma kresko nun post la kongresoj. Parte eble ĉar iuj vidis la revuon kaj decidis, ke indas aboni. Mi esperas tion...

Ĉu la legantoj esprimis siajn opiniojn al vi direkte?

◆ Ĉiam, kiam revuo ŝanĝas redaktoron (kaj speciale por revuo kiel Kontakto, kie la redaktoro estas ege grava), okazas perturboj. Foje pli grandaj, foje malpli grandaj. La legantoj timas. En la komenco de mia redaktoreco kelkaj esprimis siajn timojn, ke la kvalito falos, sed post la unuaj numeroj plejparte mi ricevis pozitivajn reagojn. Krome, nun alvenadas altkvalitaj artikoloj regule ankaŭ de homoj, kiuj antaŭe ne kunlaboris. Se estis negativaj reagoj, temis kutime pri enhavo, nome pri iu artikolo, kiu kolerigis aŭ malplaĉis. Sed tiaj estis tre, tre malmulte.

Al mi persone plaĉas precipe la internacieco de Kontakto. Certe ne facilas pritrakti ĉiujn kontinentojn egale. Bonvolu rakonti iom pri tio!

◆ Ho, tio estas ĉiam mia problemo kaj ankaŭ plezuro. Mi strebas, ke ĉiu numero enhavu verkaĵojn de ĉiuj kontinentoj, sed mankas tre kontribuantoj el Oceanio, norda Ameriko kaj orienta Azio. Krome, mi provas trovi ekvilibron inter “leĝeraj” kaj “seriozaj” temoj, kaj ne ĉiam facilas kombini la temospecojn kun la kontinentoj tiel, ke estu ekvilibro en ĉio. Estas kiel granda puzlo.

Kiuj estas viaj aliaj celoj kiel redaktoro?

◆ Mi volas fari informplenan kaj samtempe distran revuon. Ne ĉiu ŝatas ĉion, kompreneble, sed mi volas, ke ĉiu trovu ion por si en la revuo. Kaj mi volas, ke la legantoj post finlego sentu, ke ili ion eksciis, aŭ ke ili amuziĝis. Eble vekiĝis ĉe ili la apetito por eksĉii pli pri iu temo – tio estus bonege!

Kontakto laŭdire estas facila revuo. De kie venas la facileco?

◆ Parte el la lingvaĵo mem. En Kontakto ekzistas tri lingvaj niveloj, normala, facila kaj tre facila. Por komencantoj ekzistas la tre facila nivelo, kiu enhavas ege simplan gramatikon kaj malmultajn vortojn. Por progresantoj ekzistas la nivelo facila, kiu havas jam la tutan gramatikon, sed limigitan kvanton da vortoj. La vortolisto aperas ĉiujare en la unua numero kaj enhavas la bazajn radikojn en Esperanto. Sed ankaŭ en la nivelo normala mi strebas al klara, simpla kaj komprenebla lingvaĵo. Tio kompreneble multege postulas de la redaktoro, precipe ĉar ĉio, de gramatiko ĝis ortografio, devas aperi centprocente ĝuste.

Ofte Esperantaj magazinoj ne estas altkvalitaj rilate la ilustradon. Kiel vi sukcesas trovi trafajn kaj belajn fotojn?

◆ Por la ilustraĵoj mi parte heredis la bibliotekon de mia antaŭulo, Francisko Veuthey, kaj parte mi jam mem de longe kolektas bildojn kaj fotos. Por la resto mi uzas mian fantazion kaj mem kreas, aŭ iras al la biblioteko, precipe se temas pri io tre faka. Nuntempe ankaŭ multaj kontribuantoj mem sendas ilustraĵojn, kio ege helpas al mia laboro. La kvalito de la papero ege gravas, ĝi influas la kvaliton de la bildoj... Ni fakte uzas finnan paperon por Kontakto, ĉar kaj la presisto, kaj mi opiniis ĝin plej taŭga.

Unu negativan kritikaĵon mi aŭdis. La paĝoj aspektas maltrankvilaj pro la diversaj tiparoj uzataj de vi. Ĉu eble temas pri juneca ludemo?

♦ Jes, mi konscias. Sed sciu, ke nur personoj el la nordo tion diras. Legantoj el pli sudaj landoj plendas, ke mi ne sufiĉe plenigas la paĝojn kaj faras tro unuecan grafikon...

Kiom ofte aperas via revuo kaj kiom ĝi kostas por finnlandanoj? Kiel oni povas aboni?

♦ Kontakto aperas sesfoje jare, ĉiun duan monaton, do, kaj kostas por tiu ĉi jaro 105 finnajn markojn. Vi povas aboni tra UEA, aŭ tra la delegito en Finnlando, ekzemple kiam vi pagas vian membrokotizon por la jaro.

Vi loĝas en Bulgario, sed la revuon oni ne tie presas sed en...?

♦ Tamen, la revuon oni presas en Bulgario, eĉ en la urbo, en kiu mi loĝas... Ankaŭ la ekspedo okazas de ĉi tie.

Ĉu tio estigas problemojn?

♦ Ne, sed faciligas la tuton. La presejo estas proksime, la poŝto same, kaj mi bezonas nur esti araneo kaj tiri la ĝustajn fadenojn en la ĝusta momento. La sola problemo estas, ke foje la transmaraj ekzempleroj ege malfruas pro poŝtaj problemoj.

Miascie vi havas ankaŭ propran eldonejon. Ĉu vi jam ion eldonis?

♦ La eldonejo nomiĝas Bambu, kaj jam eldoniĝis fabeloj en la turka, verkaĵo mia propra en Esperanto ("Durankulak", aĉetebla en la libro-servo de UEA aŭ rekte ĉe Bambu) kaj unu multlingva eldonaĵo de Ljubomir Trifonĉovski, kiu ĵus vizitis Finnlandon. Inter la planoj estas pliaj verkoj en Esperanto, kaj io en la germana...

Tiaj entreprenemo kaj kuraĝo estas admirindaj. Ĉu nenio en la futuro timigas vin?

♦ Ne vere. Eble influis miaj restadoj en Azio kaj la lastaj du jaroj en Bulgario, tiel ke mi perdis la timon pri la estonto. Mi kutimas vekigi



Sabira Ståhlberg. Foto: Pasquale Zapelli.

matene kaj pensi kiel Winnie-la-Pu: kion interesan mi faros hodiaŭ? (La Urso precipe pensis pri matenmanĝo, sed por mi la demando havas tuttagan signifon.)

Ĉu mi rajtas demandi, kial vi elektis Bulgarion kiel vian loĝlokon?

♦ Post kiam mi estis ĉi tie unuafoje, mi ne povis ne reveni. Bulgario, precipe Varna, havas tion, kion mi ŝatas en Azio, kaj tion, kion mi ŝatas en Eŭropo, do perfekte por mi. Aldonu al tio agrablan klimaton, multan sunon kaj la maron, sen kiuj mi ne povas vivi. Mi loĝas tie, kien venas la turistoj (ankaŭ finnaj) por feriumi...

Dankon al vi, Sabira, pro la intervjuo kaj sukceson al Kontakto kaj Bambu.

Intervjuis retroŝte R.P.

Giorgio Silfer prelegis pri *PEN-Klubo*

Konata esperanta redaktoro Giorgio Silfer prelegis pri agado de *PEN-Klubo Internacia* lundon vespere la 7-an de septembro 1998. Je la 18-a horo en la prelegsalono de la universitato de Helsinko kolektiĝis 16 geaŭskultantoj, kiuj ricevis esperantlingve bonegan kaj klaran prezentadon pri la historio de PEN-Klubo kaj pri planoj de *Esperanta PEN-Centro*. La prelegon aranĝis Esperanto-klubo de Helsinko. Post la enkonduko, en kiu G. Silfer resumis historion de PEN-Klubo Internacia, partoprenantoj havis eblecon prezenti demandojn al la preleganto. Krome G. Silfer okazigis kun aŭskultantoj de la prelego etan rolludon. En ĝi al li estis prezentitaj du tipaj demandoj fare de ordinara PEN-membro pri utileco kaj graveco de esperanto, kaj li respondis profunde kaj vaste. Post la 20-a horo la diskutado daŭris en Marina-hotelo.

Ni eksciis, ke la mondkongreso de PEN-Klubo Internacia (6.9.-11.9.1998 en Helsinko) partoprenis el Esperanta PEN-Centro du reprezentantoj, Giorgio Silfer kaj Ljubomir Trifonĉovski. Kongrespartoprenantoj en Marina Kongrescentro en Helsinko estis ĉirkaŭ 300. Pro vojaĝkostoj kaj parte ankaŭ pro lingvaj malfacilaĵoj ne ĉiuj centroj povas ĉiam sendi siajn reprezentantojn al la kongreso – kutime nur duono el la centroj ĉeestas. Esperanta PEN-Centro klopodas aranĝi, ke dum la mondkongreso de PEN-Klubo unu esperanta reprezentanto venus el la kongreslando – tiel certe okazos ĉe venontaj mondkongresoj (en Pollando, en Ruslando).

Giorgio Silfer rakontis pri modesta sinteno de finlandaj aranĝantoj rilate al siaj naciaj lingvoj; nun la gastiganta centro decidis uzi

nur la du oficialajn lingvojn de PEN en la kongreso, nome la anglan kaj la francan. La aranĝanta centro estus rajtigata uzi ankaŭ la oficialajn lingvojn – la finnan kaj la svedan – de si mem. Laŭ G. Silfer en Helsinko estis ankaŭ tria Esperanton scipovanta PEN-membro, Johano Strasser el Germana PEN-Centro.

PEN-Klubon fondis ĉefe anglaj kaj francaj verkistoj kaj ĵurnalistoj laŭ iniciato de Sir John Galsworthy por defendi liberan esprimopovon de ĉiuj verkistoj en la jaro 1921. De tiu tempo devenas la du oficialaj lingvoj de la mondorganizo. Mallongigo de PEN staras por anglalingvaj vortoj: *Poetoj, Ezeistoj, Novelistoj, romanistoj, tradukistoj, eldonistoj kaj redaktoroj*. En Helsinko la hispana lingvo estis akceptita kiel la tria oficiala lingvo de PEN-Klubo Internacia.

Jam dekomence PEN-Klubo reprezentis literaturojn. Tion montras jam la fondo de la tria PEN-Centro en la jaro 1922, kiu estis la kataluna PEN-Centro. En Finnlando PEN-Centro estis fondita en la jaro 1927. Nun funkcias 132 PEN-Centroj, inter ili ia. la roŭma (zigana), kurda kaj esperanta PEN-Centroj.

Nia preleganto emfazis, ke principoj de libera esprimo kaj eldonado estis tiuj, kiujn PEN ĉiam kuraĝe defendis, kaj tutan tempon defendas, en tiu rilato estante tute malneŭtrala organizo. Ekzemple PEN-Klubo Internacia eksigis en la jaro 1933 sian germanan PEN-Centron el la membreco de la monda PEN pro tio, ke la landa centro ne komencis kontraŭstari agadon de nazioj. Ankoraŭ, dum niaj tagoj verkistoj kaj ĵurnalistoj estas en vivdanĝero en multaj landoj – ili estas arestatataj,

punhakataj, enprizonigataj kaj mortigataj pro tio, ke ili kuraĝas skribi veron.

En la jaro 1964 PEN-Klubo Internacia fariĝis ne-registara organizo (NRO), kio signifis komencon de kunlaboro kun UN-organizoj, speciale kun la eduka, scienca kaj kultura organizo UNESCO. Ekonomiaj agadeblecoj pliboniĝis ekde tiam, ĉar UNESCO subvencias siajn kunlaborantajn organizojn.

Esperanta PEN-Centro estis fondita antaŭ sep jaroj, en la jaro 1991, kaj ĝi estis akceptita esti plenrajta membro de PEN-Klubo Internacia en la mondkongreso de Santiago de Compostela du jarojn pli malfrue, la 10-an de septembro 1993. Tiun daton estis definitive agnoskita Esperanto kiel literatura lingvo – tiun fakton ja sciis esperantistoj dum pli ol cent jaroj. Ekde tiam Esperanta PEN-Centro partoprenis agadon de la monda PEN. La influo de Esperanta PEN-Centro estis rimarkinda en *la Universala Deklaracio pri Lingvaj Rajtoj*, kiu estis proklamita en Barcelono la 6-an de junio 1996.

Ni aŭdis, ke tre grava parto de la laboro de PEN-Klubo Internacia estas farata en konstantaj komitatoj. Ili okupiĝas pri tradukarto kaj lingvaj rajtoj, pri verkistoj por paco, pri verkistoj en prizono kaj pri virina agado. Esperanta PEN-Centro estas aktiva inter la du unuemenciitaj komitatoj. Ĝuste tie aktivis PEN-Centroj, kiuj reprezentas minoritatajn lingvojn kaj literaturojn. Ekster mondkongresoj okazas regionaj konferencoj, kie multe da PEN-laboro estas farata dum



kunsidoj de komitatoj. Grava estas ekzemple ĉiujara konferenco en Slovenio. Venontjare en Slovenio okazos la unuan fojon dum la historio de PEN-kongresoj prelego pri Esperanto, tiam sub la titolo "Esperanto – ĉu literaturo por la paco?"

Esperanta PEN-Centro aktive subtenas projektojn, kiuj faciligos kaj plirapidigos la mondvastan agnoskon de Esperanto kiel lingva identigilo. Unu etapo tien estas *Pakto por la Esperanta Civito*, lanĉita de

diversaj Esperanto-organizoj la 10-an de aŭgusto 1998. Esperanta PEN-Centro estis inter la unuaj por ratifiki la pakton. Pri evoluo kaj pri raportado koncerne de la pakto zorgas ĝia evolukomisiono. Celo estas, ke Esperantio estos akceptata kiel observanto de la EU-Buroo.

Fine Giorgio Silfer lumigis ankaŭ planojn de Esperanta PEN-Centro. Inter venontaj kvin jaroj vere verŝajna estos internacia PEN-kongreso, aranĝota de Esperanta PEN-Centro. Ĉar Esperantio ne estas limigata al iuj landoj aŭ mondpartoj, estos studata ebleco kongresi surŝipe, kaj dum krozado viziti havenojn de landoj, kie agadas PEN-Centroj kaj kie funkcias samtempe sufiĉe fortaj Esperanto-organizoj. Dum la mondkongreso unu el la oficialaj lingvoj estus tiam Esperanto. Ĉu tiam Esperanto estos konsiderata kaj agnoskata kiel lingva identigilo, tio restos por vidi – laboroj por tio nun antaŭeniras.

Raportis kaj fotis: Antti Mikkola

Nepezaj unuaj paŝoj en Esperantio

Pasporto al la tuta mondo

Videobenda kurso por instrui

la Internacian Lingvon

Lecionoj 1 kaj 2

Verkita de d-ro Paul Gubbins

Konceptita de prof-o Edwin Grobe

1998 Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA)

Mazi en Gondolando estis rekte esperantigita versio el la videokurso de la angla linvo por infanoj. Nun nordamerikaj esperantistoj, kaj fakuloj kaj amatoroj, faras sian propran videokursan projekton, kiu neniel havas kontakton kun la angla lingvo, kvankam ĝi estas filmita ĉe Bayshore Studios en San Francisko, Usono. La unua frukto de la projekto estas la 1-a kaj la 2-a lecionoj de Pasporto al la tuta mondo. Kaj la projekto daŭras dank' al bonvolemaj donacantoj kaj helpantoj. Oni mencias en la fintekstoj de la videobendo Heta Kesälä el Finnlando kiel fakula helpanto de la projekto.

La videobendo rakontas pri familio Bonvolo. La patro Georgo estas filozofo. Lia edzino Filisa

laboras kiel dancistino. La gefiloj Jolanda, Karlo kaj Helena havas profesion de juĝisto, kuristo kaj skulptisto. La videospektantaj infanoj povas tre klare fari diferencon inter la anoj de la familio Bonvolo, ĉar ĉiu el ili portas vestaĵon konvenan al sia profesio. Adoltajn personojn tia konkretigo iom ĝenas. En la unua leciono familio Bonvolo ricevas per Pasporta Servo novzelandan gaston, ŝafiston Ruselo.

Dum la unua leciono la videospektanto senpene lernas kiel oni salutas en Esperanto. Li/ŝi lernas diri sian nomon kaj de kie li/ŝi venas. Oni povas diri ekde nun en Esperanto kion oni faras aŭ ne faras. La spektanto lernas kie estas iu propra aĵo. Kaj pri familiaj rilatoj li/ŝi povas rakonti per Esperantlingvaj vortoj. Kaj fine la spektanto lernas kalkuli ĝis dek en Esperanto. En la du lecionoj estas frandaj detaloj. Ekzemple en la E-vendejo de S-ino Bundo la prezoj estas markitaj en Steloj, la Esperanto-moneroj. La videobenda kurso portas la nomon Pasporto al la tuta mondo, kaj ĝi komencas per alveno de gasto pere de Pasporta Servo. Tial la kurso instruas ne nur lingvon sed Esperanto-kulturon, kiun ĉiu eĉ komencanto konatiĝas dum la lingvolernado kaj uzo de Esperanto en praktiko.

Aimo Rantanen

Venecia festo en Finnlando

Sur la okcidenta marbordo ni havas feston, kiun ni nomas “venetsialaiset”. Ĝi okazas en la lasta semajnfino de aŭgusto kaj dum ĝi ni adiaŭas la someron. Post la festo ni purigas kaj fermas niajn somerdometojn por la vintro, ĉar en septembro oni ne ofte ŝatas saŭnadi kaj bani sin en la maro aŭ lago. Neniu scias, de kie venas la nomo kaj la kutimoj de la festo. Se ankaŭ vi en venonta aŭtuno ŝatus adiaŭi la someron laŭ nia “venecia” tradicio, faru tiel ĉi:

♦ Invitu geamikojn aŭ nur familianojn al via dom(et)o. Ankaŭ balkono taŭgas, aŭ apartamento kun grabda fenestro sur parko aŭ arbaro, prefereble proksime al akvo.

♦ Kuiru ion bongustan. Aĉetu trinkaĵojn laŭ via gusto.

♦ Ornamu la hejmon per floroj kaj kandeloj, la balkonon, ĝardenon kaj akvobordon per fajroj kaj lanternoj.

Kion pozitivan esti esperantisto?

*Aleksander Korĵenkov:
Esperanto post la jaro 2000
La unua "diskutkajero" de UEA
Rotterdam 1998*

Esperanto ne estas la dua lingvo por la tuta mondo, sed la unua lingvo por la Esperanto-komunumo. Tian iom cinikan aforismon la leganto povas formi leginte diskutkajeron de Aleksander Korĵenkov, rusa inĝeniero, redaktoro de altkvalita E-periodaĵo La Ondo de Esperanto, eldonanto de pli ol 50 libroj kaj funkciulo en la ruslanda Esperanto-movado. La libreto de Korĵenkov, verkita en bona stilo, donas ĝuon pro ĝia spriteco. Malgraŭ eteco ĝi donas grandajn pensojn aktualajn por ĉiu esperantisto ĉe la sojlo de jarmilŝanĝo.

La verko pritraktas sociologajn aspektojn de Esperanto-movado, en ĝi estas prezentitaj novaj vidpunktoj al la nuntempe intensa diskuto inter Esperanto-eminenculoj kaj ankaŭ laĵoj pri la esenco de la socia aspekto de Esperantio, ĉu

movado aŭ komunumo. Aŭ ĉu Esperanto estas internacia lingvo de diasporanoj kiel armenoj, judoj kaj ciganoj? Laŭ Nikola Raŝiæ la Esperanto-komunumo similas sociologe aliajn internaciajn movadojn kaj hobigrupojn. Mi persone pensas ke oni ne eniru tro profunde en la aspekton de komunumo rilate al Esperanto-movado, ĉar ni ne estas nacio sen hejmlando aŭ konsiderinda etna minoritato. Multaj esperantistoj konataj al mi emfazas la ŝatokupan karakteron je tio ke oni estas esperantisto.

Malgraŭ iom da cinikaĵoj, Korĵenkov trovas longan liston pri pozitivaj trajtoj esti esperantisto, ekzemple: 1. Per Esperanto oni lernas pli facile aliajn lingvojn. Intensaj kontaktoj kun lingvorientitaj esperantistoj helpas la lernadon. 2. Esperantisto povas ankaŭ ricevi per tiuj kontaktoj konsilojn pri eksterlingvaj aferoj kaj kreskiĝi kiel homa individuo. 3. Esperanto ebligas sendiskriminacian komunikadon inter ordinaraĵoj homoj sen rasismo kaj ksenofobio. Kaj fine: 4. Esperanto ne kreskigas nur individuon, sed liajn/ŝiajn talentojn, kiuj povas esti uzitaj ekzemple en profesia vivo.

Aimo Rantanen

♦ Por la geknaboj vi eble aĉetu karnavalajn aĵojn, ekzemple bruegajn aĵetojn, kiujn ili nomas "papatti", sed tiam vi devos toleri malbonodoron kaj eksplodetojn, kiujn ne ĉiuj ŝatas.

- ♦ Kantu kaj muziku laŭ viaj eblecoj.
- ♦ Mendu belan veteron de la bona Dio.

El tiaj ingrediencoj vi kun la familio kaj geamikoj kreos la festan etoson, sed memoru, ke la beleco de la naturo ludas gravan rolon en tiu ĉi somerfina festo. Tial en trankvilo kaj silento ĉiu atentu la naturon, la kolorojn de la ĉielo kaj akvo, la malheliĝon kaj la unuajn stelojn. Oni rajtas ankaŭ sola aŭ nur duope festi.

En la urboj de la okcidenta marbordo ni povas renkonti la venecian festo-etoson en foiroj, koncertoj, teatraĵetoj. Ni povas aŭdi kaj flari la eksplodetojn de la geknabaj artfajraĵoj en la kortoj jam post la tagmezo, kaj pli grandajn artfajraĵojn ni eble vidas en la nokta ĉielo. La sekvan tagon la gazetoj priskribas ĉion tion per koloraj fotoj kaj pli malpli laŭdaj raportetoj. Okazas tamen aŭtunoj kiel tiu en 1998, kiam pluvegoj malhelpas la fajrofeston. Inter la urboj, kie oni atentis ĉi tiun feston mi menciis speciale la urbojn Kokkola kaj Raŭmo.

Saliko

Seuraavat jutut etanapostina toimittajalle

Itsestäni johtumattomista syistä s-postiosoitteeni <aimo.rantanen@pp.inet.fi> ja Esperantolehden toimituksen s-postiosoite <aorantan@jylk.jyu.fi> eivät toimi tällä hetkellä. Siksi pyydän lähettämään seuraavaan lehteen tarkoitettua materiaalia joko paperilla tai levykkeellä etanapostissa osoitteeseen: Esperantolehti, Aimo Rantanen, PL 2, 40801 VAAJAKOSKI.

Sekvaj artikoloj en helikopoŝto al la redaktoro

